

Joseph Mohr,
Paca nokt'

tradukita de Joachim Gießner

Paca nokt', sankta hor',
malkviet' foras for.
Nur maldormas la sankta par',
knabo eta kun bukla harar'
dormu en ĉiela trankvil',
dormu en ĉiela trankvil'!

Paca nokt', sankta hor',
paŝtistar' en ador'.
Tra l'angela haleluja
al la mond' sonegas ja:
venis Krist', la Savant',
venis Krist', la Savant'.

Paca nokt', sankta hor',
dia fil', via kor'
donas amon dian sen fin',
de malbon' vi savis ja nin,
Krist', per via naskiĝ',
Krist', per via naskiĝ'.

*Traduko de la Germana poemo "Weihnachtslied" de JOSEPH MOHR (*1792 – †1848) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-136-271 (2004-01-25 15:29:33)

La tradukinto, Joachim Giessner, estis ĝis 2002 la estro de Germana Fervojista Esperanto-Asocio. Li tradukis multajn kantojn en la Internacian Lingvon. Kelkaj troviĝas en aldono al la ttt-pagharo de GEA <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html> kaj ankaŭ en la kantlibro "Mia kantaro" de Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, tel. +49-(0)7721-508891, retpoŝto: Josef.Schiffer@esperanto.de.